BEL informas

n-ro 3/2016

la 18an de aprilo 2016

18 de abril de 2016

Kongresa Rezolucio de 2016

Resolução dos Congressos de 2016

Kun multe da ĝojo BEL Informas disvastigas la rezolucion akcpetitan de la 51-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj de la 36-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso. Kiel kutime la rezolucio estas rezulto ĉefe de la kunsido de kongresanoj por diskuto pri la kongresa temo, ĉi-okaze "Verda komunikado: kiun lingvon internacian mondo daŭripova devus uzi?". La kongresaj rezolucioj utilas kiel grava gvidilo por la estraro. Minimume de 2012 ĉiu rezolucio estas konsiderata laŭ la evoluo de la jaro.

Com muita satisfação, o BEL Informas divulga a resolução aceita pelo 51º Congresso Brasileiro de Esperanto e pelo 36º Congresso da Juventude Esperantista Brasileira. Como de praxe, a resolução é um resultado principalmente da reunião de congressistas para que se discuta do tema do congresso, neste caso "Comunicação verde: que língua internacional um mundo sustentável deve utilizar?". As resoluções do congressos servem como um importante guia para a diretoria executiva. Pelo menos desde 2012, toda resolução tem sido contemplada no decorrer do ano.

Rezolucio de la 51-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj de la 36-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso

Ni, la partoprenantoj de la 51-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj de la 36-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, kuniĝintaj en Manaŭso, Amazonio, de la 22-a ĝis la 26-a de januaro,

Sciante, ke Esperanto estas lingvo kulture diverseca, socie justa, ekonomie ebla kaj ekologie ĝusta,

Opinias, ke la respondo al la demando "kiun lingvon internacian mondo daŭripova devus uzi?" estas klara kaj ke Esperanto devas jam roli tiusence en la nuntempa kaj en la proksime estonta socio, ĉefe rilate al la inkluzivo kaj engaĝiĝo de junaj generacioj;

Atentigas ankaŭ, ke aliflanke daŭripoveco de la Esperanto-movado tuŝas agadojn ekster Esperantujo, tiel ke esperantistoj devas interesiĝi pri daŭripoveco aŭ ke Esperanto-institucioj devas veki en la esperantistoj tiun interesiĝon, kun la celo, ke oni partoprenu en neesperantistajn eventojn pri la temo konanta la ĝustajn argumentojn pri la rilato Esperanto kaj daŭripoveco kaj sekve trafe antaŭenigu la uzon de Esperanto en la socio;

Konscias, ke devas esti strategio pri informado kaj trejnado pri Esperanto kaj pri daŭripoveco, uzante plej eble plurajn rimedojn, de artikoloj en revuoj kaj aŭdvidaj materialoj en televido kaj en similaj platformoj al okazigo de specifaj trejnseminarioj pri la temoj;

Rekonas la gravecon de la libro, de la radio kaj de la interreto por Esperanto, tiel ke agadoj por la disvastigo de la esperanta kulturo pere de libroprovizo al bibliotekoj, libroeldonado kaj sona kaj filma produktado devas esti strategie antaŭenigataj;

Instigas, ke estu pli da partnereca agado inter la Esperanto-movado kaj aliaj grupoj, tiel ke la respondeco pri la uzo de Esperanto kiel lingvo de nova daŭripova ordo ne restu nur al la esperantistaj aktivuloj, sed ankaŭ al aliaj aktivuloj;

Agnoskas, ke la pluraspekta kapabligo de esperantistoj devas plu resti en strategiaj planoj de la Esperanto-movado, sed ke Esperanto-institucioj devus ankaŭ konsideri la strategian kapabligadon pri Esperanto de neesperantistoj talentaj en siaj fakoj;

Kaj rekonfirmas kiel nian ĉefan celon plu permesi al la homaro plenan posedon de la lingvo Esperanto kaj plu disvastigi la diversflankan kulturon florantan ĉirkau la lingvo, tiel ke la decido pri kiel uzi Esperanto kaj kiel agi por daŭripova mondo restu al ĉiu individuo kiel libera memelekto.

BEL/BEJO	*BEL/BEJO*

TED kaj Esperanto	**TED e Esperanto**

La 21-an de Oktobro 2015, kiel anoncite en nia BEL Informas, okazis la evento TEDxGoiânia, prelegaro laŭ TED-modelo, kies ĉeftemo estis “La Estonteco Alvenis!”, ĉar ĝi okazis en la sama dato kiam Marty McFly (rolulo el la 1980-jardeka filmo “Back to the Future 2”, t.e “Revenen al la Estonteco 2”) vizitas la estontecon. Unu el la prelegantoj estis Fabio Santos, esperantisto kaj EAGO-membro el Gojanjo, kiu nuntempe loĝas en Alto-Paraizo de Gojaso, kiu parolia pri “La plej efika teknologio pri globa komunikado”, tio estas, Esperanto.

Nun la video disponeblas por spektadi ĉe:

https://youtu.be/x4wjOXw17k4

EAGO/BEL Informas

No dia 21 de outubro de 2015, como anunciado em nosso BEL Informas, ocorreu o evento TEDxGoiânia, conjunto de palestras segundo o modelo TED, cujo tema principal foi “O Futuro Chegou!”, porque ocorreu na mesma data em que Marty McFly (personagem do filme da década de 1980 “Back to the Future 2”, isto é, “De Volta para o Futuro 2”) visita o futuro. Um dos palestrantes foi Fábio Santos, esperantista e membro da EAGO de Goiânia, que atualmente mora em Alto Paraíso de Goiás, que falou sobre “A melhor tecnologia de comunicação global”, isto é, o Esperanto.

Agora o vídeo já está disponível para ser assistido em:

https://youtu.be/x4wjOXw17k4

EAGO/BEL Informas

Novaĵo

Aperis PROGRESIGA ESPERANTO: por meza kurso. La 2-a el 3 libroj por kompleta

Novidade

Foi lançado ESPERANTO PROGRESSIVO: para curso intermediário. O 2º de 3 livros

kurso (baza, meza kaj spertiga). Por klasoj kun instruisto. Kurso dinamika kaj rapida, tute parolata en Esperanto ekde la 1-a leciono. Kun ekzamenaj modeloj pretaj por la instruisto (havigotaj de la verkinto per retpoŝtadreso trovebla en la libro-prezento). Kun preta Plano de Kurso por la instituticio en 2 lingvoj (same havigota de la verkinto). Oni povas aĉeti la libron per la retejo de la eldonejo Baraúna: http://www.editorabarauna.com.br.

Azuil Vasconcellos

para o curso completo (básico, intermediário e avançado). Para turmas com professor. Curso dinâmico e rápido, todo falado em Esperanto desde a 1ª aula. Possui avaliações-padrão prontas para o professor (fornecidas pelo autor por e-mail disponível na apresentação do livro). Possui Plano de Curso pronto para a instituição em 2 línguas (igualmente fornecida pelo autor). O livro pode ser compradono site da Editora Baraúna: http://www.editorabarauna.com.br.

Azuil Vasconcellos

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Malkovru en via BEL@Butiko

Esperanto para principiantes

Nova edição do famoso curso de Aloísio Sartorato, ricamente ilustrado e com opção de se baixar o áudio em MP3. Compre, aprenda, estude, presenteie. Apenas R$ 30,00. Confira em:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/esperanto-para-principiantes.html

BEL Informas/BEL@Butiko

Descubra em sua BEL@Butiko

Por la mondo

CD “Por la mondo”, da banda Merlin, com grandes canções como “Por la mondo”, “Estas la leĝo”, “Estis unu fojo”, “Bluaj fragoj”, “Mia vojo”, “Mi kredas”, “En ĉi tiu momento”, “Pri la vero”, “Elprovo”. Compre agora este ótimo disco:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/por-la-mondo.html

BEL Informas/BEL@Butiko

AL BEL-MEMBROJ: POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon:

AOS MEMBROS DA BEL: PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SEU CÓDIGO JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

Visite a sua loja virtual:

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Ana Ribeiro, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Eduardo Silva, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Juliana Evandro, Lucas Barbosa, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Marcus Aurelius Farias, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu viajn novaĵojn al BEL informas

Ĉu vi deziras kontribui por la dulingva informilo de BEL kaj BEJO sendante

Envie as suas notícias para o BEL informas

Você deseja contribuir com o boletim bilíngue da BEL e da BEJO, enviando

novaĵojn? Se jes, bonvole plenigu la formularon per la necesaj datumoj:

novidades? Se sim, por favor preencha o formulário com as informações necessárias:

Sendu viajn novaĵojn

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel